

Postrigardo al la IX. tutsokola kongreso en Praha.

Antaŭ 100 jaroj naskiĝis la fondinto de la sokola gimnasta asocio d-ro Miroslav Tyrš. Je lia memoro estis dediĉita la IX. tutsokola kongreso en Praha.

Kiel bela sonĝo vivas la grandaj tagoj en la memoro do la tuta ĉeĥoslovaka popolo. La tagoj de la Naŭa estas for, sed la fortaj impresoj de la giganta entrepreno vivas. Ili vivas profunde en la koro de ĉiu Ĉeĥoslovako ili vivas kiel unika travivaĵo en ĉiuj gastoj-fremduloj venintaj el ĉiuj anguloj de la tuta mondo. Ili ĉiuj travivis la miraklon, per kiu la tuta ĉeĥoslovaka popolo manifestis sian unuecon, sian volon al vivo kaj libereco, sian fidelecon al la respubliko kaj ĝia unua reprezentanto kaj prezidento T.G. Masaryk.

La programo de la kongreso estis ampleksa. Ĝin malfermis la dekduan de junio la plej junaj Sokoletoj-falketoj. Tridek-mil infanoj, ses ĝis dekdu jaraj gimnastis kaj ludis antaŭ cent-kvindek-mil rigardantoj. Inter la rigardantaro estis ankaŭ la prezidento de la respubliko, al kiu tre plaĉis la ritmaj ekzercoj kaj gajaj ludoj de la sanaj infanoj. De la tribunoj aspektis la gimnastejo kiel granda, multkolora herbejo ŝanĝanta sian dominantan koloron ĉe ĉiu movo de la Sokoletoj. Saneco kaj gajeco, jen la ĉefaj trajtoj de la infana Sokoltago, Saneco. Pro la eksterordinare varmega tago multaj homoj svenis kaj devis esti forportataj. Sed nur malmultajn infanojn oni vidis sur la portiloj. Bone karakterizas la spiriton de niaj malgranduloj jena epizodo. Kiu havis binoklon, povis bone observi ĝin. Dum la gimnastikado svenis subite malgranda knabino-dekjarulino, ĝuste antaŭ la tribuno de la prezidanto. Tuj venis du samaritanoj, metis la knabinon sur la portilon kaj foriris. Sed subite ekbaraktis la malsanulineto, forsaltis de la portilo, rekuris la dek paŝojn al sia loko kaj daŭrigis sian interrompitan gimnastikadon. Ridante aplaŭdis la prezidento la bravan knabinon. Reveninte hejmen en siajn urbojn kaj vilaĝojn la infanoj fieris pri tio, ke ili vidis la paĉjon Masaryk. Sed nur unu knabineto povas fieri pri tio, ke ŝi, speciale ŝi, estis aplaŭdita de la prezidento. La nomo de la knabino? Neniu scias, ĉar ŝi perdiĝis en la tridekmila amaso da geknaboj. Parolante pri la celo de la Sokola asocio la s-ro prezidento diris: "La venonta generacio devas esti pli nobla kaj pli sana ol la nia" La tago de la plej junaj gesokoletoj rajtigas la konvinkon, ke la vortoj de la ŝtatestro plenumiĝos.

Post preskaŭ dusemajna paŭzo festis sian kongreson la Sokoloj-gejunuloj. Dudek-kvin-mil junuloj kaj junulinoj venis el la tuta respubliko por manifesti la antikan principon: En sana korpo, sana spirito. Ducent-kvindek gastoj-Sokoloj el la amika Jugoslavujo aliĝis al tiu ĉi impona manifestacio. La ĉefurbo Praha alprenis sian plej belan festan vestaĵon. Dekmiloj da flagoj flirtis de sur la tegmentoj, ĉiu fenestro estis ornamita, per flagetoj, floroj kaj arbobranĉetoj. La urbo dronis en la abundo da brilaj koloroj kaj novajn ondojn da koloro kaj ĝojo alportis en la stratojn la miloj da junul-Sokoloj, la blankĉemizaj junuloj kaj la ruĝjupetaj junulinoj. Sep kilometroj estis la distanco de la lasta ĝis la unua marŝanto. Riverego da juneco kaj esperplena estonteco. Kiel uragano da ĝojo tondris la krioj: "Vivu la paĉjo Masaryk, vivu la respubliko, vivu la ora Praha".

Ĝi tondris kontraŭ la domoj, ĝi tondris kontraŭ la bluega ĉielo. Sur la ĉielo aeroplano. Granda kaj malalte. Ĝia siblado ne estis aŭdebla. Ĝi perdiĝis en la eterna ááá, la sola restaĵo de la Sokola saluto: Nazdar!, kiu envolvis la dekmilan marŝantaron kaj la centmilan rigardantaron kiel nepenetrebla tavolo. Kiel neĝeroj aspektis la miloj da blankaj poŝtuketoj, kiujn svingis la knabinoj plenaj de ĝojo kaj entuziasmo, kies marŝado ŝanĝiĝis preskaŭ je danco. Dudek-ok muzikistaroj verŝis ritmon en la marŝantaron. Plej kore kaj plej vive estis ovaciita la grupo de la jugoslavaj junul-Sokoloj.

~~(La konata)~~ Amerika profesoro de ekonomio el Bostono (s-ro Filone) diris: "Rigardante la dekmilan marŝantaron mi ne vidis nur la gejunulojn, sed ankaŭ la estontecon bonan kaj kreantan. La ideoj de Tyrš, kiujn reprezentas la Sokolaro, estas unu el la sanigiloj, kiuj povas savi la mondon".

Sur la gimnastejo rikoltis la gejunuloj tondran aplaŭdon de cent-mila rigardantaro. Elasteco kaj movemo estis la ĉefaj trajtoj do la gejunuloj. Kiel granda kaj vasta grenkampo, promesanta riĉan rikolton, ondanta en printempa vento, jen la impreso de la gimnastikantaj gejunuloj. Ĉe ĉiu movo ŝanĝiĝis la bildo sur la gimnastejo, bildo transiranta per elasta ondo en alian neatenditan, kiu per sia ĉarmo forte emociis ĉiun rigardanton.

Fine venis la tri ĉefaj tagoj de la kongreso, la tria, la kvara kaj la kvina de julio. Granda estis

la intereso per la tagoj de la infanoj kaj gejunuloj. Sed la intereso per la ĉefaj tagoj superis ĉiujn esperojn de la aranĝantoj. Preskaŭ kvaronmiliono da lokoj estis destinitaj por la rigardantaro. Tamen dekmilajn returnigis afiŝoj sciigantaj, ke ĉiuj lokoj estas okupitaj.

La eksterlandaj gastoj miris pri la grandeco de la gimnastejo, kies longeco estis tricent-deknaŭ kaj larĝeco ducent-du metroj. Sed plej forte ilin surprizis, precipe la fakulojn, la surmarŝo de la Sokoloj sur la gimnastejon. Kiel riverego, ĉion superakviĝanta ili ekaperis sur la ejo, per firma paŝo en precizaj vicoj po sepdek-du viroj. La riverego sesoniĝis kaj poste dudek-duoniĝis en ĉiam pli malfortajn riveretojn. En mirinde mallonga tempo ĉiuj deksepmil-dek lokoj de la gimnastejo estis okupitaj. La riverego ŝanĝiĝis en maron, en maron jen kvieta, jen ondanta kaj muĝanta. Kaj la mevojn akompanis deksepmilvoĉa ĥoralo de la gimnastantoj. Ĥoralo, kiu ŝajnas esti en sia forteco voĉo de superhoma estaĵo. Ĉielen sonas la vortoj de l'ĥoralo: "Al suno ni levu la brakojn, la drakan semaĵon la amo pereos, eterna movo nia leĝo, en nova mond', nova, bela land'. La ĥoralo finas kaj la miloj da gimnastoj staras senmove kiel antikaj statuoj. Kaj en la koroj de centmiloj finsonas la lastaj vortoj de l'ĥoralo: "Nova, bela land'. Diserva silento regas super la homamaso. La gimnastoj viviĝas. Tondra aplaŭdego akompanas la formarŝantan pacan armeon.

"Vera organizacia miraklo", jen la vortoj de la ĝenerala sekretario de internacia gimnasta asocio (s-ro Dalbanne, Belgujo), en kies kritiko ĉiu dua vorto estas superlativo; belega, bonega, grandioza. Sammaniere parolis kaj skribis la centkvindeko da eksterlandaj ĵurnalistoj alvenintaj el ĉiuj kvin partoj de la mondo. Ilian raporton vi certe legis en viaj naciaj gazetoj. Ilin ĉiujn surprizis la maniero. Kiel la kvaronmiliono vizitantaro bonvenigis la ŝtatestron T.G.Masaryk, aperanta sur la tribuno en sia blanka vestaĵo. Unu el la plej maljunaj eksterlandaj ĵurnalistoj diris: "Tio ne estas la kutima signo de ĝentileco kaj estimo al la estro de la ŝtato. Oni sentas krome la personan rilaton, la koran fidelecon de la popolo al sia reprezentanto kaj lia verko. Mi vidis preskaŭ ĉiujn ŝtatestrojn en Eŭropo - antaŭ kaj post la milito - kiel ili estis salutataj de la popolo. Ili ĉiuj povas envii vian prezidenton".

La impresoj, kiun postlasis la viroj, ŝajnis ne superebla en sia impona grandeco kaj forteco. Tamen la plej belan spektaklon prezentis la virinoj. Dum ilia gimnastado kun blankaj kegloj la gimnastejo aspektis kiel marbordo kun dancantaj feinoj. Ludema ĉarmo, jen la trafa vorto por tio, kion oni mirante vidis. La vicoj ŝanĝiĝis en retojn kaj rondojn kaj denove en vicojn. La areo ŝanĝiĝas en geometriajn figurojn kaj dume dancas la kegloj kvazaŭ vivaj estaĵoj. Forteco kaj disciplino estis la trajtoj de la vira gimnastado, beleco kaj ĉarmo de la virina.

Simbolan sencon havis la "Songo de Tyrŝ". Ĝi montris, ke la idealoj de la antikvaj Grekoj estis ankaŭ la idealoj de dro Tyrŝ, kiuj vivas en la Sokolaro. La moderna gimnastejo ŝanĝiĝis en antikvan luktejon. Sceno kun antikva pastraro en antikvaj kostumoj oferanta al dioj malfermas la ludojn de Olimpio. Sekvas vetveturo per duradaj veturiloj, kiu vekis en la publiko ekscitigan intereson. Lukto. Ĝi montris, ke la dumiljara tempospaco ne multe ŝanĝis la homon, ĉiam amanta pacan lukton, alportanta al la venkinto la plej altan honoron, la laŭrobranĉon.

Krom la ĉeĥoslovakaj Sokoloj gimnastis Sokoloj kaj gastoj el Ameriko, Bulgarujo, Finnlando, Francujo, Hispanujo, Jugoslavujo, Latvujo, Polujo, Rumanujo, Rusujo, kaj malgranda grupeto da Luzaciaj Soraboj el Germanujo. Ili ĉiuj gimnastis tre elegante kaj plene meritis la rikoltitan aplaŭdon.

Venis la fino de la kongreso kaj kun ĝi la plej impona manifestacio, kiun la malnova urbo vidis. Kaj ni aldonu la aserton de milnombra aro da eksterlandaj fakuloj kaj ĵurnalistoj. Manifestacio, nenie en la vasta mondo videbla. Sesdekmil viroj kaj virinoj, aplaŭditaj de centmiloj rigardantoj, marŝis tra la urbo, entuziasme ovaciante la maljunan prezidanton. Jen plenumiĝo de la songo de d-ro Tyrŝ.

Unu kaj duonmiliono da homoj vizitis dum la kongresaj tagoj la gimnastejon. Duonmiliardon da ĉeĥaj kronoj ili elspezis, preskaŭ cent milionojn da svisaj frankoj. Kaj la sola fundamento, ideala kaj reala, sur kiu firme staris la tuta entrepreno, estis la libervola disciplino kaj oferemo de la Sokolaro.

Kiam ni, estimataj geaŭskultantoj, manifestos en tiel grandioza maniero por la ideoj de d-ro Zamenhof? Ideoj, kiuj vivas ankaŭ en la Sokolaro, ĉar montrante la celon de la Sokola movado la

prezidento diris: "Ĉiam, kiam vi vokas Slavon, homo respondu al vi".

16. VIII. 1932 18-18.¹⁵ elsendita sub titolo: Theodor Kilian: Post la kongreso de la slava Sokolaro.